Asocio Espéranto-Genève-Régions
Ĝenerala Jarkunveno
Bierejo ĉe Cheminots, la 14-an de novembro 2011

Protokolo

Ĉeestantoj : Charmian Common, Didier Cornuet, Jacqueline Favre, Jean-Loup Gaudin, Gilda Pace, Paula Vité, Richard Wilson, Marie Zoller
Senkulpiĝis : Ghyslaine Gantert

1. Elekto de tagprezidanto
   MZ estis elektita tagprezidanto.

2. Elekto de protokolanto
   ChC estis elektita protokolanto.

3. Aprobo de la tagordo
   La tagordo estis aprobita unuanime.

4. Elekto de komitato
   Konsentis agi kiel komitatanoj : Charmian Common (Informiloj), Jean-Loup Gaudin (kasisto) kaj Marie Zoller (Prezidanto). Pliajn komitatanojn bezonas kaj bonvolas !

5. Raporto de la kasistoj
   JLG prezentis detalan raporton de la kontoj ĝis la fino de 2010. Pro manko de la kontoj de la Poŝt-Oficeja konto, estis decidita prokrasti la voĉdonon por ke la kaskontrolantoj povu fari la taŭgan laboron. JLG proponis ke estontece nur unu kasisto estu elektita, kaj bonvolus plenumi la postenon.

6. Elekto de kasisto kaj du kaskontrolantoj
   Prokrastita - vidu supren. DC kaj RW konsentus daŭrigi la laboron, post aprobo de la kontoj kaj elekto.

7. Agado ekde oktobro 2010
   MZ kaj ChC konstatas ke estas tre malfacile se oni nur raportas ĝis la fino de la antaŭa jaro (ekz. la raporto pri kontoj nur iris ĝis 31 decembro 2010). Do ni konsentis ke ni raportu ĝis la fino de la monato antaŭ la kunveno (ekz. 31-a de oktobro 2012), kaj JLG aldonos la informojn pri la kontoj.

   La Lunda Grupo daŭre kuniĝas ĉiun lundon kaj faras valoran laboron por disvastigi esperanton en Ĝenevo. Ĝi ankaŭ certigas ke ĉiuj ĉeestantoj praktiku regule la lingvon - ne ekzistas multe da grupoj kiuj faras la samon.

   Aprilo-Majo 2010 : Partopreno en la LibroFoiro de Ĝenevo.
   Somere 2010 : Esperanta tago ĉe Richard
   Septembro 2010 : EGR partoprenis la Forumon de Asocioj en St Genis-Pouilly.

   2011
   15-a de Januaro : Vizito de la Prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Sinjoro David Ryan kun la tuta familio - edzino, filinoj, bopatrino. 9 lokaj esperantistoj renkontis ilin en ilia hotelo en Ĝenevo kaj poste ni promenis en apuda parko kie la filinoj feliĉe ludis ĉe aparatoj.

   Fine de Januaro : Kunveno de la Kuirarta Grupo.

9. Kontrolo de adresoj de membroj
   Listo de membroj cirkulis kaj kelkaj korektoj estis faritaj. Ni demandas al ĉiuj membroj bonvolu korekti la liston (vidu alfiksaĵon ĉi-kune) aŭ sendi korektojn retpoŝte.

10. Partopreno al venonta LibroFoiro kaj Aliaj agadoj
Post mallonga diskuto, ni konstatas denove ke la LibroFoiro estas multekosta, oni ne havas multajn vizitantojn kaj neniam scias pri la rezulto de nia laboro. Ĉi jare, la Alternativa Vilaĝo ne povis partopreni, do ni ne ĉeestis. Ni verŝajne ne partoprenos la LibroFoiron de Ĝenevo en 2012. Ni diskutis pri aliaj agadoj :

- DC parolis pri la inform-kunveno de Michele Gazzola kaj JEGG ĉe Maison des Associations. Fakte, nur 10 homoj ĉeestis, inter ili nur 5 estis novaj esperantistoj. Tamen, li proponis ke ni organizu similan aranĝon en St Genis-Pouilly.
- MZ proponis ke ni kreu malgrandan afiŝon por meti, ekzemple, en Coop Blandonnet, kie ili havas tabulon cele al Asocioj. ChC konsentis prepari ion. GP diris ke eble estus bone pripensi pri la "Escalade" en Ĝenevo, kie amasiĝas multaj homoj.
- JLG proponis ke ni provu stari "Esperantan Kafejon", kiel faras la franculoj de UFO (vidu la retejon de Espéranto-France : http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-19-novembre-2011). Temas pri elekti kafejon en Ĝenevo kaj organizi grandan kuniĝon, oni uzu interretajn eblecojn por informi la plejmultajn homojn, kaj prepari ion specialan - ekzemple kanti en Esperanto. JLG kaj MZ informiĝos pri eblecoj.

11. Raporto pri grupaj agadoj

Nur la kuirarta grupo kunvenis. Do ni decidis iom ŝanĝi la strukturojn de la grupoj :
kanti en Esperanto (respondeculoj MZ kaj DC) (3 foje jare)
lerni gestolingvon (MZ informiĝos)
kuiri parolante Esperanton (JLG) - ne ŝanĝis
manlaboroj - provizore, ni metu inter krampoj

12. Preparo de prezento de Esperanto
Ni diskutis tiun temon pasintan jaron, sed neniu okazis. MZ proponis ke ni invitu Sylvain, unu el ŝiaj lernantoj kiu estas instruisto kaj volas prezenti esperanton en sia lernejo. MZ bonvolas sekvi la aferon. ChC proponas lokon ĉe ŝi. Ni esperas ke Georgette Friedly konsentos helpi nin.

12. Informiloj, retejo
ChC raportis ke ŝi komencis krei verdan paĝon (pri ekologio), sed alfrontis la problemon de tradukado - la tekstoj ofte nur ekzistas en la angla kaj la franca. Do volontuloj por traduki en esperanto bonvenas. ChC tamen daŭrigos la laboron.
Pri broŝuroj, pluraj membroj trovis erarojn en la nova broŝuro (Esperanto - nia lingvo) kaj en la lasta Limsaltanta Folio (No. 5) ne nur post disvastigo de malneta versio por kontrol-legi, sed ankaŭ post la finpretigo de la teksto. Por provi eviti tion, ChCi petis volontulojn por kontrol-legi la malnetojn - RW kaj DC konsentis.

13. La aparta adreso ĉe la retejo
ChC raportis ke ekde la kreo de aparta adreso por EGR laŭ propono de MZ dum la lasta kunveno (esperantoegr@gmail.com), ni ricevis neniun mesaĝon - do ĉu ni gardu ĝin ? Estas laboro por kontroli ĝin, se oni ne faras sufiĉe ofte, teorie oni povus maltrafi ion gravan. Temas pri la adreso kiu troviĝas en la retaj paĝoj kiu egalas al kutima rubriko "Kontaktu nin". Do eble estas sufiĉe da informoj en la paĝoj, kaj la homoj ne bezonas kontakti nin. Estis decidita reteni ĝin provizore.

Konkludo de la kunveno.

La venonta kunveno okazos komence de novembro 2012.

☆